GISTO- JAN-2005
G.O.Vaske
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
ttt-kongrua skribo.

PREPARAJ IDEOJ POR LA 40ª.BKE.

Italaj gesamideanoj lerte diskonigas paroligan metodon. Ili frue pretigxas por la 91ª UKE. (Florença, jan 50/07 – 11/07de2006). Tre placxis al mi ilia dinamika trejnado, por ke chiuj farigxu kuragxaj E-parolantoj. Ili adoptas jenan metodon kiu malinhibicias. Grupo promenas tra urbo, fraulino rolas chicheronon, montras la vidindajxojn kaj nacilingve klarigas aspektojn en la momento vidatajn. Alterne unu el la "turistoj" devas esperante klarigi tion kion la chicheronino nacilingve diris al la vizitantoj. La aro da "vizitantoj" komprebeble surbruste portos etikedon: 40ª BK de Esperanto. Chiuj laute parolu. Tia agado bele reklamos Esperantujon kaj la Kongreson inter la gaucharo. Tasko por la E-instruistoj: arigi chiujn gelernantojn kaj alihxi al tia trejnado.GEA nur ne devos iniciati tiajn gajajn paroligajn promenojn se chiuj aktivuloj jam kapablas redakti unupagxan tekston, sen enlasi pli ol tri erarojn. Certe ne facilas havigi al si liberan tempo sed...por prepari tiel gravan eventon kiel BKE, chio validas. Memoru ke BKE en Porto Alegre gravas tiom ke gxi meritas nian tutan fortostrechon, same kiel por venki fakultatan enirekzamenon. Ne sufichas lerni/parkerigi ion nur unu horon tage Prefere difini unu tutan tagon, unufoje chiusemajne, por stachanovi gxis elcherpigxo. Chu plenkontento, same kiel ricevi triagradan diplomon, ne kontentige kronos kaj superbe premios la penon? Chiu gaucho nepre aligxu al la Kongreso! – Miaurba lernantino jam aligxis.

FERGS BOIKOTAS

En la tago 12/01, mi vizitis nian chefurbon POA, trairis la straton Andrade Neves kaj kontrolis la montrofenestrojn de la Spiritisma Asocio (Chu Societo?)Alan Kardek. Neniu libro en/pri Esperanto videblis. La esperantistoj sin demandas, chu ech en la jaro kiam okazas la 40ª BKE en RS, nia FERGS ne volas kapti la oportunon relevigxi el la tristaj jaroj da bojkotado kontrau la FEB-eldonejo kaj kontrau la brazila esperantistaro? Tamen, restas utiltempo. Oni esperas ke FERGS baldau eksponos almenau paron da vortaroj kaj, flanke de la libroj metos grandliteran skribajxon nacilingvan, por ke chiu gaucho povos sciigxi pri la plej grava E-evento de Brazilo kaj, ke gxin gastigos nia chefurbo, en Julio chijara, au prezentu ion kiel la suba teksto, manke de pli trafa/efika anonco (GEA-estraro sentu sin devigata konsiigi la FERGS-estraron pri la graveco de BKE):

40° BKE.

OS ESPERANTISTAS GAÚCHOS TÊM A HONRA DE HOSPEDAR EM PORTO ALEGRE-RS MUITAS CENTENAS DE SAMIDEANOS DO BRASIL E DE OUTROS PAÍSES, DURANTE O 40° CONGRESSO BRASILEIRO DE ESPERANTO. TODOS SÃO BEM-VINDOS. INSCREVAM-SE E PARTICIPEM TAMBÉM DA DM-LOTO, PARA QUE O MOVIMENTO ESPERANTISTA EM 120 PAÍSES POSSA SEMEAR A PAZ PELA PONTE DA AMIZADE ENTRE TODOS OS POVOS !

NOTO –Chiu samideano BV instigi la FERGS-estraron, ke la supra eta informo estu videbla en iliaj librovendejoj.

KRUCVORTENIGMO

Gxis hodiau neneiu GISTO-leganto postulis de mi helpon, kiel promesite, por solvi la lastan kaprompilon aperinta en la revuo Esperanto. Lau mi, estas bona signo, ke chiuj sukcesis rompi la duran nukson. Gratulojn!

TESTO – Chu vi scias, kiel diri "consegui decorar o texto - não nasci ontem – bajulador não não goze de proridade – retornei ontem da viagem – faltou dinheiro no meu bolso".
DEFIO – Metu au demetu diakritojn kien kaj kie nesesaj – "Per sinksandvichoj hom' freneza sin nutrus per dieto peza – Ĉu vere inter ĝardenfloroj necesas kelkaj ŝarklaboroj? – Ĉu belulino por la balo sin vestas supre per la salo? – Vi havas malbanalan kazon se muso flugas sur la nazon – Se nun avidas vi pastecon, ne diru "Mi deziras pecon" – Jes, pri leteroj ja kontrolu sed pri postajo ne parolu!(El Faktoj kaj Fantazioj).

Vastan vortprovizon akiras nur diligentuloj. Chu vi posedas la paron da vortaroj Esp/Port kaj Port/Esperanto? Se ne, mi bedauras, vi ne rajtas konsideri sin bona esperantisto en chi jaro kiam okazas BKE en POA.

KD

Ne kredeble...neniu Gisto-leganto manifestigxis rilate al sperto surdiskigi dek minutan reklaman paroladon pri Esperanto, kiun mi havas sxancon disaudigi pere de miaurba Komunuma Radio. Dauras mia atendo.

Charma pianludo, far Enrike Chia. Eksterordinare richenhava KD, por kiu aprecas tutmonde konatajn melodiojn: PIANO ROMÂNTICO, trovebla en Galeria Chaves.

PROPONO – Kiu E-parolanto, unu au du personoj,prefere geo, ne gejo au toksuzanto, volas pasigi tutan tagon che mi? De POA al Kaiurbo la veturo dauras 01,20h.(R$ 07,00) Lasta revenebleco al POA, je la 19,50h. La propono celas rutine babili dum mi plenumos miajn farendajxojn chiutagajn: en la centro, dum mi prizorgas aferetojn, kafumi/sukumi, piede reveni al mia hejmo(1000m for), radioamatori (nur marde mi rajtas paroli, pro TVI),sabate kaj dimanche eblas kontakto kun foraj geamikoj, plani strategiojn, ktp. La vizito okazu provacele en la gaucha BKE-jaro. Interesato(j) kontaktu min utiltempe – 51-635.1389.

KNABOJ

Patrino veturigas auton. Malantaue sxiaj du filoj. Post duhoroj longa stratsxtopigxo sxi kolerege eksplodas: Silentu, fermu la busxon, mi ordonas. Sxi kolere ordonas "donu al mi la revuojn, la biskvitojn...chesigu la kverelon...silentu!...ne plu parolu unu al la dua, restu unu metron for de la alia kaj rigardu tra la fenestro! " – Kvin minutojn poste unu el ili plore gxeme grumblas "Panjo, Sxiko insistas rigardi tra mia fenestro! – Kompreneble nenia novajxo por gepatroj de pluraj buboj, kiuj ne kapablas teni vartistinon. Gxi taugu kiel averto por junaj gefrauloj, kandidatoj toleri senfinajn kverelojn.

ADOPTU, NE ACHETU SXATBESTON! Ili estas same lojalaj kaj amindaj.